The lowest possible prices are charged in EAB's book service, and occasional bulk purchases are made at advantageous prices. Special offers are advertised in *EAB Update*. Requests for books not in stock can be ordered for you from UEA, then you pay EAB in sterling, saving hassle and money.

As a member, you receive an information pack, which will be updated regularly. Much of the work of EAB in Britain is done by volunteers, so there is a list of contacts and a request for your help. The EAB office can assist you with information about the British Congress, which also is run by a volunteer committee.

You can access a wealth of information on EAB's website (*www.esperanto-gb.org*), as well as the book catalogue and links to Esperanto associations worldwide, and an events calendar. Learners may search *www.esperantoeducation.com* for the latest offers on teaching materials and courses, and a good deal more besides.

Volunteers undoubtedly set a high value on membership or they wouldn't spend so much time working for the benefit of others. Everyone who contributes time or money has the personal satisfaction of helping EAB in its aim to publicise and educate the public in the International Language Esperanto.

JMB

Trustees aim to hold enough reserves to meet any emergency or shortfall in income for whatever reason.

The trustees decided to designate £100,000 over five years to the Springboard to Languages project. Should the project founder, then the money remaining could be used for other purposes.

Total available resources as at 31 October 2005: £1,580,487

LESS

For restricted purposes
(Library, Publicity, Education, Africa, Garden) £27,043
Designated for the *Springboard* project £93,773
Fixed Assets, including the new building £178,550
Capital Fund from sale of 140 HP Ave. held to generate income £903,183
John Brownlee endowment fund (interest only to be used) £52,945

This leaves Free Reserves of £324,993 which the trustees consider reasonable to cover any eventuality.

Investment policy

EAB's policy is to invest capital in unit trusts specifically designed for the charity sector, to meet the need for both income and growth for many years, at the same time permitting the release of capital for well-considered projects in furtherance of the charity's aims. Under the Constitution, the charity has power to make investments as the trustees see fit.

The split of investments between categories is:

Cash	32%
Fixed Interest (bonds)	20%
Equity (shares)	30%
Property units	18%

Total value of cash and investments at 31 October 2005: £1,394,471.


Responsibilities of the trustees in relation to the financial statements

Law applicable to charities in England and Wales requires the trustees to prepare financial statements at the end of each



Glossy full-colour poster

now available from EAB at £5.99 incl. p.&p.


A flying start!



Eight good reasons for you to choose *Springboard*:

-  It's multicultural.
-  Transition is a breeze.
-  Class teachers can teach it.
-  It doesn't require huge chunks of time.
-  It's relatively easy.
-  Children enjoy it.
-  It's cheap.
-  Differentiation isn't a problem.

Springboard...to languages!
A unique introduction to foreign languages.
www.springboard2languages.org



baleno

<i>German</i>	Kaninchen	<i>French</i>	ours
<i>Frisian</i>	knyrn	<i>Italian</i>	orso
<i>Estonian</i>	küülik	<i>Portuguese</i>	urso
<i>English</i>	coney	<i>Romanian</i>	urs
<i>Croatian</i>	kunić	<i>Spanish</i>	oso




papago

<i>French</i>	baleine	<i>Slovakian</i>	papagáj
<i>Hungarian</i>	bálna	<i>Croatian</i>	papagaj
<i>Lithuanian</i>	banginis	<i>Dutch</i>	papegaai
<i>Turkish</i>	balina	<i>Hungarian</i>	papagáj
<i>Albanian</i>	balenë	<i>Turkish</i>	papağan

www.springboard2languages.org


e cousins
...not so far removed!

<p>kato</p>  <p><i>Norwegian</i> katt <i>German</i> Katze</p>	<p>lupo</p>  <p><i>Italian</i> lupo <i>Portuguese</i> lobo</p>
---	--

Respect for other people and other languages


Do you know, almost all schools these days are multicultural and multinational and in many cases a child's first language, or the language used at home and in the local community, is *not* English? I think each child's language and culture deserve to be equally valued and treated with equal respect.

Indeed! And in order to encourage this respect, it is very important to present all languages as equal. If you use English as a base language to raise awareness of other languages, as in this model...




... children might begin to draw undesirable conclusions. They might begin to think: 'English is the world language', 'English is better than all other languages', 'My language is better than yours' and by extension 'I am better than you'.

On the contrary, using a *neutral* and *fair* language as a *springboard* to other languages, like this...



...sends messages of respect and equality for ALL languages: a child comes to understand...

...that 'All languages are equal', 'All languages are equally valuable', and by extension 'We are equal' and 'You deserve respect as much as I do'. That's great!



www.springboard2languages.org

financial year which give a true and fair view of its financial activities during the year and of its financial position at the end of the year. In doing so the trustees are required to:

- select suitable accounting policies and then apply them consistently
- make judgments and estimates that are reasonable and prudent
- state whether applicable accounting standards and statements of recommended practice have been followed subject to any departures disclosed and explained in the financial statements; and
- prepare the financial statements on the going-concern

basis unless it is inappropriate to presume that the charity will continue in business.

The trustees are responsible for keeping accounting records which disclose with reasonable accuracy at any time the financial position of the charity and enable them to ensure that the financial statements comply with the Charities Act 1993. They are also responsible for safeguarding the assets of the charity and hence for taking reasonable steps for the prevention of fraud and other irregularities.

Approved by the trustees and signed on their behalf by:

Prof. J.C. Wells,
President
11 February 2006

EAB-Gisdate • 11

Vendo de brokantaj libroj

Elekto tre diversstema por ĉia gusto!


HB = bindita; SB = broŝurita; p. = paĝoj. Prezoj inkluzivas poŝtkostojn kaj pakadon.

Bona mesaĝo de Jesuo El la helena tradukis Gerrit Berveling – *Laŭ Marko* (p.63) £2; *Laŭ Mateo* (p.84) £2; *Laŭ Luko* (p.90) £2; *Laŭ Johano* (p.91) £2. SB. Brazilo: Fonto, 1992.

El subaj fontoj Eli Urbanová. La dua originala poemaro, 'sentoriĉa' kaj 'muzikplena', de la ĉeĥa intimista aŭtorino. Prago: 1981. SB (p.95). En bona stato. £1.00

Eroj kaj aliaj poemoj Marjorie Boulton. Eble la plej grava originala poemaro en Esperanto de la brita aŭtorino. La Laguna: Stafeto, 1959. SB (p.367). £1.00

Esperanto – The World International Language 'Six books in one', incl. textbook, dictionary and grammar. Compiled by George Alan Connor, Doris Tappan Connor, William Solzbacher, J.B. Se-Tsien Kao. Londono kaj Novjorko, 1948. HB (p.245) £2.00



Eŭgeno Onegin A.S. Puŝkin. El la rusa trad. N.V. Nekrasov. Romano en versoj. Parizo: SAT, 1931. HB (p.234) £1.20

Ezopa Saĝo K. Kalocsay. Sepdek sep fabeloj verse reverkitaj. Kopenhago, 1936 HB (p.127) £2.00

Freŝa mateno Reuven Kritz. El la hebrea tradukis Ota Ginz. Vivo de junuloj en Israelo. Israelo, 1967. HB (p.277) £2.00

Geedziĝaj moroj de ĉinaj nacimalplimulto Tian Xing. El la ĉina tradukis Feng Yi. Pekino, 1989. SB (p.157). En bona stato. £1.50

Homaranismo Delio Pereira de Souza. La interna ideo (de L.L. Zamenhof). Brazilo, 1994. SB (p.81) £1.50

Homa vivaventuro, La Giordano Moya. Eŝearo pri etiko, ekonomio, esperantismo. Barcelono, 1987. SB (p. 300) £2.00

Hundo Kruso, La R.M. Ballantyne. Elangligis J.M. Inman. Aventuroj de ĉasistoj kaj lerta hundo inter la indianoj en Usono. SB (p.150) Britio, 1951. £1.20

Hungara antologio Redaktis K. Kalocsay. Renoma antologio el la hungara nacia literaturo. Budapeŝto, 1933. SB (p.460) £2.50

Kataluna antologio Dua eldono, rekomendita de Akademio de Esperanto. Barcelono, 1931. SB (p.400 netranĉitaj) £3.00

Kaukazaj rakontoj M.J. Lermontov. Elrusigis D. Staritsky. De la fama rusa novelisto; bele plaste bindita. Roterdamo: UEA, 1964. (p.70) £1.20

Kombilo, La Lina Gabrielli. Originala Esperanta rakonto, sufiĉe facila lingvo. Romo, 1962 SB (p.72) £1.20

Konsolo de la filozofio Boecio. Tradukis el la latina d-ro Albert Goodheir. Glasgovo, 1984. SB (p.139) £1.50

RAKONTO

Sovetia aventuro - el la vivo de esperantisto

Antaŭ multaj jaroj, kiam ankoraŭ ekzistis la 'malvarma milito', kaj la komunisma sistemo ankoraŭ regis en Soveta Unio, mi partoprenis en ege agrabla feriado en malgranda urbo Volskiji apud Volgogrado, kiu antaŭe havis la nomon Stalingrad, kie estis la plej granda batalo de la Dua Mondmilito.

Oni parolas pri vi kun policianoj

En la fino de la feriado, grupo de ni iris al la trajnstacidomo por reveni al Moskvo. Estis eble dudek minutoj antaŭ la foriro de la trajno, kiam mi eniris la dormvagonon. Mi montris mian biletan al la frostvizaĝa, dika servistino, kaj ŝi kondukis min al mia kupeo. Mi lasis miajn pakaĵojn sur mia lito kaj eliris por adiaŭi miajn novajn kaj antaŭkonatajn geamikojn. Ni staris sur la perono kaj ŝercis, babiladis kaj kantis. Subite unu de miaj amikoj diris: 'Erik, la dormvagonestrino parolas kun du policianoj kaj fingromontras vin! Kaj la du policianoj venis al mi kaj petis miajn pasporton kaj vizon. Feliĉe ĉio estis en ordo. Ni finfine eniris la trajnon kaj komencis la 24-horan vojaĝon al Moskvo. Mi sidis en la kupeo kun Zhu Bin, ĉina kuracisto, kiu praktikadis en Moskvo.

Post horo, venis la ĉefkonduktoro de la trajno, agrabla, nejuna viro, kiu petis min veni al la kupeo de la servistino. 'Estas malgranda problemo pri via bileto,' li diris. Mi iris kun Zhu Bin, kiu interpretis por mi. Ni sidis en la kupeo de ŝi, kiu sidis kun falditaj brakoj, kun severa esprimo sur sia vizaĝo. La konduktoro klarigis ke, kiam mi montris mian biletan al la

servistino (la nomo 'servistino' estis tute ridinda afero, ĉar tiu tipo de homo tute ne 'servas', ŝi estas reĝino kaj la klientoj estas nur kanajlaro!), ŝi ankaŭ vidis mian pasporton kaj estis klare, ke mi estas 'okcidentano'. Tamen mia bileto estas speco sole por rusoj. Okcidentanoj devas havi bileton, kiu kostas dekoble pli! Plue, okcidentanoj devas sidi en speciale rezervita kupeo!

Sed, la agrabla viro diris: 'Ne estu maltrankvila, la tuta afero estas stultaĵo, kaj vi povas resti kun via amiko, sed mi devas skribi vian nomon kaj pasportnumeron en mian incidentan libron.' Dume la virino daŭre sidis kun malamika mieno. Eble ŝi pensis, ke mi estas riĉa, malbona kapitalisto, pri kiu ŝi ofte legis en *Pravda* kaj volas ekspluati la landon de socialismo.

Ni trinku hejmfaritan brandon

Do, ni finis kaj ekstaris kaj, kiam ni komencis ekiri, mi diris al Zhu Bin, ke li informu ilin, ke antaŭe mi mem estis laboristo en la brita fervoja sistemo. Kiam la virino aŭdis ĉi tiujn vortojn, ŝia mieno tute ŝanĝiĝis! Kun rideto ŝi diris, 'Ne foriru! Sidiĝu, kaj ni drinkos hejmfaritan brandon. Do ni denove sidiĝis, drinkis kaj iomete babiladis, kaj poste reiris al nia kupeo.

Post horo la virino venis, denove kun brando kaj glasoj, kaj denove ni drinkis. Vespere ŝi alportis por mi teleron kun viando kaj pano. La rusoj en la kupeo rigardis kun vaste malfermitaj okuloj. Eble ili miris, kiu estas ĉi tiu eksterlandano, por kiu la 'reĝino' de la vagono alportas nutraĵon? Eble la nevo de Winston Churchill?

Do, bona ekzemplo de tio, ke kiam estas io por ligi homojn, la etoso povas ege ŝanĝiĝi!

Eric Walker

Distru nin en Scarborough!

La Loka Kongresa Komitato, de la Brita Kongreso de Esperanto ankoraŭ bonvenigas sinproponojn por la programo de la **Distra Vespere**, kiu okazos sabaton, la 29-an de aprilo.

Bonvolu tuj kontakti kun Jack Warren, letere: 11 Linden Grove, Linthorpe, Middlesbrough TS5 5NF, aŭ retpoŝte: pwarren47@onetel.com.

Kvin virinoj de amoro Ihara Saikaku. El la japana tradukis Miyamoto Masao. Kvin rakontoj pri Japanio. Ōsaka, 1966. HB (p.160) £2.00

Lingvaj aspektoj de Esperanto (1924-1963) Bruno Migliorini. Eseo. Pisa, 1985. HB (p.91) £2.00

Malfacilas esti Dio A. kaj B. Strugackij. El la rusa tradukis A. Juravljov. Fantascienca rakonto de la mondfama rusa duopo. Moskvo, 1992. SB (p.168) £1.00

Mi amas junulinon Walter Trebisch. El la franca tradukis Adolf Burkhardt. Konfidenca korespondado inter afrikaj geamantoj. Germanio, 1966. HB (p.140) £1.50

Nova Testamento, La Londono: British & Foreign Bible Society, 1929. HB (poŝformata: 7,5x11,5cm) (p.358) £1.00

Nova Testamento, La + Apokalipso Londono: British & Foreign Bible Society, 1913. HB (10,5x14,5cm) (p.613) £1.60
Simila: 1982. HB (12,5x19,5cm) (p.225) £1.40

Nuda inter lupoj Bruno Apitz. El la germana tradukis Karl Schulze. Romano honore al la mortintoj de la koncentrejo Buchenwald. Leipzig, 1959. HB (p.480) £3.00

Peer Gynt Henrik Ibsen. El la norvega tradukis Erling Anker Haugen. Norvegio 1951. SB (p.258) £2.00

Psalmaro, La Londono: British & Foreign Bible Society, 1931. SB (poŝformata: 7,5x11,5cm) (p.224) £0.60

Rimleteroj Esperanta korespondado en rondeloj inter Marjorie Boulton kaj William Auld dum 1953 kaj 1954. Manĉestro: dua eldono, 1986. SB (p.93) £1.20

Sep fratroj Aleksis Kivi. El la finna tradukis Ilmari Ekström. Fama romano de la finna literaturo. Helsinko, 1947. HB (p.360) £1.75


Ŝtelisto de persikoj, La Emilijan Stanev. Elektitaj noveloj kaj rakontoj el la bulgara. Sofio, 1985. SB (p.127) £1.20

Sub la jugo Ivan Vazov. Tradukita el la bulgara. Triparta romano el la vivo de la bulgaroj dum la antaŭjaro de ilia liberigo el la turka okupado. Bulgario, 1959. HB (p.460) £3.00

Tragedio de l' homo, La Imre Madách. La dua traduko de la drama poemo el la hungara fare de K. Kalocsay. Budapeŝto, 1965. HB (p.253) £2.00

Vivo de Nia Sinjoro Jesuo Charles Dickens. Verkita speciale por liaj infanoj. Tradukis Montagu Butler. Londono, 1934. HB (p.118) £1.50

Vivo kaj morto de Wiederboren Kolekto de dek du originalaj humuraj kaj satiraj noveloj por progresintoj, inkluzive de verkoj de Auld, Lorjak, Nemere, Rossetti, Schwartz, Szathmári k.a. Kaliningrad: Sezonoj, 1998. SB (p.80) £1.00



Use your vote effectively

Dear Editor,

As some of your readers already know, I am not standing for re-election to the Management Committee this year. As is so often the case, this is due to a combination of circumstances: taking over from Kate Hall as Secretary of NoJEF, commitments to SATEB and the Scottish Association (which I had not foreseen when I stood for election last year), taking over from Paul Hewitt as *peranto* for a number of overseas Esperanto magazines – and the ongoing drama of trying to convert a Calabrian cowshed into a breathtaking refuge for sun-starved Esperantists (and other deserving cases). I most assuredly am not reducing my involvement in the worldwide movement – far from it.

One positive consequence of not standing for election, however, is that I am free to speak more freely than can a candidate. I hope you will allow me a few column-centimetres to reassure any of your readers who have received from another member of Management Committee (and candidate for re-election) a letter defamatory of me and other Trustees, that allegations made in that letter are, categorically, untrue and unsupported by any substantive factual evidence. I know of several cases, but I have no way of knowing how many people have received such letters. Those who have received such a letter, know who sent it; those who have not seen one of these letters may wonder what I am talking about, but I have no wish to further aggravate the situation by naming names. Better that I

repeat the plea I have made before and elsewhere: if you know a candidate and are confident that she would make a good Trustee, vote for her [I am, of course, trying to be gender-neutral]; if you know a candidate but doubt whether he (whatever good qualities he may possess) is cut out for the work of the Management Committee, then for Goodness' sake, vote against; and if you don't really know the candidate, or are unsure, then abstain. But let's all use our votes responsibly and positively: only in that way will we get a Management Committee that truly represents us, the members of EAB.

I remain available to assist the new Management Committee in any way I can.

Esperante,
David Kelso

PS I have deliberately written this letter in English, to ensure that it is accessible to all EAB members, whatever their level of mastery of Esperanto.



Projekto Indiĝenaj Popoloj

Kiel ĉiuj gravaj grupoj, la Esperanto-movado devas konservi sian esencan signifon. Tamen, ĝi devas ankaŭ ŝanĝiĝi kaj evolui, por ke ĝi ne perdu la kapablon esprimi kaj realigi tiun esencon kaj tiun signifon.

Inter la bazaj dokumentoj de la Esperanto-movado estas la Statuto de UEA. Artikolo tri de la statuto deklaras, ke UEA, kaj pro tio la esperantistaro, devas ne nur disvastigi la uzadon de Esperanto kaj agadi por solvi la mondan lingvan problemon, sed ankaŭ 'plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn

kaj materialajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko, aŭ lingvo'.

Tiu citaĵo indikas la direkton, laŭ kiu vojaĝas la Projekto Indiĝenaj Popoloj. PIP celas fari kontakton kun indiĝenaj popoloj por informi al ili pri la ekzisto kaj la celoj de Esperanto, kaj pri la manieroj, per kiuj indiĝenaj popoloj povos uzi Esperanton; ĝi celas ebligi al la indiĝenaj popoloj kontakton kun interretaj Esperanto-kursoj, inter aliaj rimedoj, por ke anoj de la indiĝenaj popoloj relative facile lernu la lingvon. Sed kial PIP celas indiĝenajn kulturojn? Kaj kion faru individuoj el tiuj kulturoj lerninte Esperanton?

Ni unue rigardu la situacion de multaj indiĝenoj kaj iliaj kulturoj tra la mondo. Indiĝenaj popoloj ofte havas problemojn trovi manieron starigi taŭgan rilaton inter sia kulturo kaj la pli moderna kulturo apud ili. La rezulto de tiu situacio estas gravaj perdoj: la indiĝenaj kulturoj kaj individuaj indiĝenoj ofte perdas sian terenon, vivmanieron, sanon, kaj eĉ vivon. Aliflanke, la modernaj kulturoj kaj individuoj ofte perdas valorajn sciojn pri la indiĝenaj kulturoj kaj, eĉ pli grave, perdas okazojn trakti respektplene kaj lerneme aliajn homojn kaj aliajn kulturojn.

PIP kredas, ke kiam indiĝenaj popoloj havos kontakton inter si per Esperanto kaj la interreto, ili povos praktike kaj emocie subteni sin per interŝanĝado de informoj kaj komuna solvado de problemoj similaj en diversaj mondpartoj. Ekzemple, terenposedado, sano, taŭgaj ŝanĝoj en edukado kaj ekonomia vivo, kaj reciproka respekto por kaj disvolviĝo de siaj kulturoj. Tio, laŭ PIP, estos konvena esprimo de artikolo tri de la Statuto de UEA.

PIP devos multe kaj saĝe labori por atingi siajn celojn. Interalie ĝi devos:

- tutmonde kontakti indiĝenajn grupojn diversspecajn
- klarigi la celojn de Esperanto kaj la manierojn, per kiuj la grupoj povos uzi Esperanton por plibonigi sian situacion

'Language is much more than an instrument, considerably more than a tool. In structuring our thoughts, in co-ordinating our social relations and in building our relationship with reality, it constitutes a fundamental dimension of the human being. It is in and through language that we live. ... Thus, on this day of celebration, reflection and mobilisation, I appeal to all the prime movers in the political and economic world and civil society so that the cause of languages and their diversity, in particular in cyberspace, may be duly appreciated and furthered in a fashion commensurate with the key issues at stake.'

Message from the Director-General of Unesco, Koichiro Matsuura, on the occasion of the **6th International Mother Language Day** – 21 February 2006.

Invitation! Esperanto Summer Festival

This traditional Esperanto summer event takes place every August, and this year is no exception. In addition to language courses for intermediate and more advanced speakers of



The Summer Festival is not all work. In 2003 the Italian Esperanto singer Gianfranko Molle provided the music ... and in 2006 participants with musical and other performing talents are invited to take part in the by now traditional entertainments evening.

Esperanto, two new programmes have been added. Under the guidance of Geoffrey King, librarian, budding researchers can derive

enormous benefit from the extensive Butler Library. Other participants might wish to enjoy a do-it-yourself tourism week taking advantage of the communal Esperanto evenings and meals.

Incidentally, the programme is flexible and participants can opt for sessions from any of the modules. Esperanto is used throughout the entire six days of the programme, during which it soon becomes apparent that it is a vibrant, living language suitable for use and enjoyment in everyday situations. Tutors this year include Paul Gubbins,

12-18 aŭgusto 2006
18-24 aŭgusto 2007

Mi tre ekscitiĝas pro la nova fleksebla kaj multflanka kursaro en Barlastono. Ĝi prezentos pli da eblecoj por diversmaniere ĝui nian lingvon kaj nian kulturon. Samtempe, tamen, la tradicia barlastona spirito restos: varma, amika kaj, super ĉio, esperanta etoso.

Pliaj informoj de: Esperanto-Asocio de Britio
eab@esperanto-gb.org
www.esperantoeducation.com/residential.html

Somera Festivalo



Okazas io nova en
Barlastono!

Geoffrey King, Terry Page, Jack Warren and Malcolm Jones. Everyone can look forward to a stimulating and varied programme. Come for one of the three-day modules or pick two complementary modules and stay the whole week!

Please book as early as possible. If you would like a course-specific leaflet, contact Viv at the office (tel. 0845 230 1887) who will be happy to post you further information, or have a look at the website: www.esperantoeducation.com/residential.

- evoluigi siajn rilatojn kun aliaj grupoj, kiuj celas helpi indiĝenajn kulturojn kaj interretan edukadon
- certigi, ke indiĝenaj grupoj havos taŭgajn lernilojn kaj ricevos necesan helpon pri la lernoprocedo
- provizi al indiĝenaj grupoj informojn pri kontakto kun similaj grupoj por interkonatiĝo kaj kunlaboro
- informi pri la laboro de PIP al registaraj, internaciaj, kaj aliaj instancoj kaj grupoj.

PIP nun serĉas personojn kun diversaj lingvaj kaj kulturaj scioj, kaj aliaj lertecoj, kiuj interesiĝas pri la indiĝenaj kulturoj. Por komenci kunlaboradon kun PIP, bonvolu kontakti: Agavo (Erik) Felker ĉe ejfelker@dslextre.com. Poŝta adreso: Erik Felker, 414 East Cedar Ave., Apt 11, Burbank, CA 91501, Usono.

MALLONGE

• UEA ĉe Eŭropa Lingva Konsilio

La 20-an de januaro okazis en Bruselo la 7-a eksterordinara ĝenerala asembleo de Eŭropa Lingva Konsilio (ELK), en kiu nome de UEA aktive partoprenis Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe Universitato de Amsterdamo.

Eŭropa Lingva Konsilio estas sendependa asocio, kiu celas plibonigi la konon de lingvoj kaj kulturoj en Eŭropa Unio kaj pli vaste. En ĝi membras institucioj de supera edukado kaj asocioj kun specifa intereso pri lingvoj. UEA estas kunfondinto de ELK, en kies unua konferenco en 1997 en Lille, Francio, ĝin reprezentis Hans Erasmus. En postaj konferencoj UEA estis reprezentita de prof. Jouko

IN SHORT

Lindstedt kaj d-ro Detlev Blanke.

Partoprenante en la Konsilio, UEA klopodas inkluzivi almenaŭ kunkonsideron de Esperanto kiel unu el eblaj kaj studindaj solvoj por la multfaceta internacia komunikproblemo. Aparte valoraj estas la personaj kontaktoj kun lingvistoj kaj lingvopolitikaj fakuloj, kiujn tiu forumo ebligas.

La plej interesaj temoj en la Brusela asembleo, kiuj meritas pluan konsideron kaj partoprenon de UEA, estis ENLU (Eŭropa Reto por Antaŭenigo de Lingvolernado de Universitataj Studentoj), konsulto-dokumento pri antaŭenigo de lingvolernado kaj lingva diverseco, kaj la projekto DYLAN pri lingva dinamiko kaj regado de diverseco. Por pli efike kontribui al ilia prilaborado kaj por ĝenerale

plifirmigi sian rolon en ELK, UEA intencas ekde nun partopreni en ĉiuj asembleoj de ELK pere de konstanta reprezentanto. Kiel konkludis Wim Jansen en sia raporto por UEA, 'ELK moviĝas precize en tiu kampo, en kiu ni serĉas enireblon kaj rekonon'.

Brazila filmo en Esperanto
Imagu-Filmoj pretigis filmeton adaptita de ĉina novelo de Han Dong, *Oranĝa ombrelo* (ĝia originala titolo estas 'Interparoli transmuren'). La cifereca vid-disko (DVD) en la formatoj NTSC aŭ PAL nomiĝas *Tiel estas la vivo*. Oni disvendas ĝin por kolekti monon por daŭrigi la filmadon (jam survoje) de libro de Claude Piron, *Gerda malaperis*, lanĉota en la venonta Brazila Kongreso de Esperanto en Campinas. La disko mendeblas de: amiko@uai.com.br aŭ imagu@uai.com.br je la kosto de 15 usonaj dolaroj, inkluzive de sendokostoj (por grupoj aŭ kluboj estas speciala rabato depende de la kvanto).

• Invito al la 83-a Kongreso de 100-jara GEA
En 2006 Germana Esperanto-

• Helpi la novan Esperanto-asociacion en Taĝikio

Taĝika Esperanto-Centro estas freŝe registrita kiel laŭleĝa asocio. Ili ĉiel ege bezonas helpon el eksterlando, aparte lernolibrojn kaj vortarojn. Oni skribas: 'Nia asocio ege estus kortuŝota, se nin ankaŭ helpos niaj samideanoj el la tra la tuta mondo.' Oni sendu lernolibrojn kaj vortarojn internaciajn kaj aliajn librojn al: S-ro Ŝaidnabi Saidilhomzoda, A. Navoi 7. app.28, 734026 Dushanbe, Taĝikio. Tel. (+992 372) 378189.

Asocio festos sian 100-jaran jubileon en sia 'naskiĝloko', nome en Braunschweig, de la 2-a ĝis la 5-a de junio 2006.

GEA invitas najbarajn kaj aliajn landajn asociojn kune memori tiun historian eventon. Krom la festprelego de d-ro Ulrich Lins okazos prelegoj de d-ro Werner Bormann, d-ro Detlev Blanke, Wera Blanke, Peter Chrdle, Zlatko Tišljarić, fakkun-sidoj, ekumena diservo, kulturaj

programeroj (klasika muziko de Trio el Herzberg, dancmuziko, koncerto de grupo Asorti el Litovio) kaj urborigardado en Braunschweig, ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo: Wolfenbüttel, Gifhorn, Herzberg. Profitu la vojaĝon por resti iom pli longe.

Detalojn pri la kongreso, aliĝilon vi povas trovi ĉe la kongresa interreta hejmpaĝo: www.jubileagek.ic-herzberg.de aŭ de: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, D-37412 Herzberg/Harz. Tel. +49/(0)5521-5983.

• Junulara semajnfino fiŝa

La 1-an de aprilo okazis 'fiŝa semajnfino' en Bulonjo-ĉe-Marco, Francio, organizita de la franca junularo JEFO. (Bedaŭrinde, la sciigo venis tro malfrue por la pasinta numero de *EAB-Ĝisdate*.) Se vi deziras teni kontakton kun niaj junaj francaj gekolegoj, plej facilas rigardi la retpaĝaron www.esperanto-jeunes.org, dekstran menuon.

• Instruistoj kongresas

La 39-a konferenco de ILEI okazos kiel antaŭkongreso de la UK en Italio, de la 25-a ĝis la 29-a de julio, en Parma. Ĝia temo estos 'Lingvaj rajtoj, lingvo-lernado kaj edukado por ĉiuj'. Detalaj informoj troveblas ĉe www.ukflorenco2006.it/unikodo/til_ar/ilei/. Oni atendas kolegecan etoson en intima rondo, plibonigon de instru-kapabloj, moderkostan loĝadon, varian programon, agrablajn vesperojn kaj tuttagan ekskurson survoje al la UK en Florenco. Informis LKK de la 91-a UK, ĉe Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano, Italio.

• Povilas Jegorovas – 'Esperantisto de la Jaro 2005'

La gazeto *La Ondo de Esperanto* iniciatis en

**LA LUPINO
KAJ ALIAJ RAKONTOJ
SAKI**



**NOVA LIBRO –
de Saki**

La rakontojn de Saki karakterizas sprita humuro, eleganta stilo, acerba satiro kaj, ne malofte, nuanco de krueleco.

Ĉi tiu nova libro enhavas tradukojn de 20 el la rakontoj de Saki, inter kiuj troviĝas kelkaj el la plej famaj rakontoj en la angla lingvo, kun notoj kaj bibliografio.

Saki (H.H. Munro):
La lupino kaj aliaj rakontoj.
Tradukis Edmund Grimley Evans. 152 paĝoj.

Prezo: £8 (aŭ £9,20 inkluzive de sendokostoj en Britio).
Mendu de EAB, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.

1998 ĉiujaran proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Internacia komisiono elektis s-ron Povilas Jegorovas, advokato el Kaŭno, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, 'pro la bonega preparado kaj sukcesa realigo de la 90-a Universala Kongreso de Esperanto kaj de la 4-a Nitobe-Simpozio en Vilno; pro la ekzemplodonaj rilatoj kun litoviaj aŭtoritatoj, intelektuloj kaj amaskomunikiloj, dank' al kiuj Esperanto progresas en Litovio; pro la kunordigo de eldonado de gravaj libroj pri Esperanto en la litova lingvo.' Solena proklamo okazis la 17-an de decembro en Kaŭno, en la tradicia Zamenhofa Tago kun ĉeesto de pluraj esperantistoj kaj ĵurnalistoj (kvin televidaj kanaloj sendis raportistojn). Kazys Starkevičius, membro de la litovia parlamento, atentigis pri la graveco de la agado de Litova Esperanto-Asocio. Respondante al la gratuloj, la laŭreato klarigis, ke li akceptas la honoron kiel rekonon de la tutlanda movado litovia.

• **Eŭropa Bulteno**

Nova numero de *Eŭropa Bulteno* estas nun legebla ĉe <http://lingvo.org/bulteno/43.pdf>. Ekfunkciis paĝo kun informoj pri la kongreso de Eŭropa Esperanto-Unuiĝo (EEU) en 2007 en Maribor (www.esperanto-maribor.si).

• **Mura kalendaro por 2006**

Ĉe <http://esperanto.sk/varbiloj/kalendaro%201.jpg> kaj <http://esperanto.sk/varbiloj/kalendaro2.jpg> eblas elŝuti kaj elprinti A3-formatan surmuran kalendaron por 2006, kun fotomozaiko el la Universala Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso de 2005. Informis petro@ikso.net.


• **John Wells intervjuigis**

La 17-an de januaro, BBC Radio 4 tre mallonge intervuis prof-on John Wells pri Esperanto por la programo PM. La temo estis la decido de Brighton College instrui al siaj lernantoj la ĉinan lingvon. Rezentantoj de diversaj lingvoj argumentis anstataŭe por sia lingvo.

La dissendo aŭdeblas ĉe la blogo de Tim Morley: <http://timsk.wordpress.com/>.

New books available from the EAB book service (prices incl. p.&p.)

Kvaronlando – Gina Ruck-Pauquet. Frankfurt am Main, 2005. Full-colour, hardback. 20p. 27cm. Four neighbouring 'countries' each have their own colour and 'mixing' is not allowed. But the children decide otherwise... A charming story for children and easy-reading for beginners. £11.83




The Esperanto Language – Frank Nuessel. New York/Ottawa/Toronto, 2000. 153p. 23cm.

A good all-purpose book written in English covering the history, culture and language, plus background information on Zamenhof. Written for the non-Esperantist general public but enjoyable also for beginners wanting to effortlessly absorb information surrounding the language. Ideal to donate to friends, family and schools. £22.70

Historio de Esperanto – A. Korĵenkov. Kaliningrad: Sezonoj, 2005. 128p. 20cm.

Handy and inexpensive history of Esperanto. The texts were prepared for Esperanto courses and seminars during the years 1998 to 2004 and cover interesting ground. £9.66



Etimologia vortaro de la propraj nomoj – André Cherpillod. Rotterdam, 2005. 21cm.

Etymological dictionary, in effect a companion volume to his *Konciza etimologia vortaro*. This one gives the etymology of more than 4,300 names, including, for example, geographical, religious, personal and dynastic names, common and otherwise. £15.70

Vivbruligita – Trans. from the French by R. Bouchet. Paris: SAT, 2004. 189p.

One woman's very personal experience of 'honour killing'. An emotional portrayal of women, victims of Islamic law as enforced by men. Very topical, heart-rending and eye-opening. Worth the read. £14.00

• **Glumarkoj Florenco**

Each sheet contains 12 stickers featuring Michelangelo's David, to commemorate the 91st World Esperanto Congress. £1.10

EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887



• Danoj agadas socie

Dana Esperanto-Asocio partoprenis la danan Socian Forumon de la 3-a ĝis la 5-a de februaro. Oni aranĝis atelierojn, kie Robert Phillipson kaj lia edzino Tove Skutnabb-Kangas prelegis pri lingva politiko en EU kaj pri diverseco lingva, kultura kaj biologia. Alia dano prelegis pri lingvomortigo. Oni havis kontakton ankaŭ kun Internacia Laborgrupo por Indigenaj Aferoj (IWGIA), kiu havas ĉefoficejon en Kopenhago, kaj interkonsentis kunlabori pri tiaj aranĝoj estontece. La dana asocio krome sendis al la danaj partamentanoj informon pri la franca oficiala raporto Grin (vidu *EAB-Ĝisdate* n-ro 32, paĝon 11). Informis Ileana Schröder.

• Interpretemuloj serĉataj

Dum la pasinta studsesio de TEJO (la junulara organizaĵo de UEA) en Strasburgo montriĝis kiel malfacilas trovi interpretistojn inter la angla kaj Esperanto. La problemo estas trovi homojn kun sufiĉe altnivelaj kapabloj kaj spertoj en tradukado, kaj tio gravas ne sole por studsesioj kun interpretado en oficialaj strukturoj. La bezono ekzistas en ĉiuj niveloj. Oni proponas solvi per trejnado de jam ekzistantaj interpretistoj por ekhavi pli grandan elekton. La celo de tiu ĉi alvoko estas kolekti interesiĝantojn kaj fondi laborgrupon en ILEI kaj TEJO/UEA. Se vi interesiĝas, bonvolu kontakti kun David-Emil Wickström (TEJO-estrarano pri kongresoj kaj aktivula trejnado) ĉe la retadreso dew@tejo.org.

• Infana kaj familia renkontiĝoj

Informoj pri la Internacia Infana Kongreseto (29 julio–5 aŭgusto), lige kun la Universala Kongreso de Esperanto en Florenco, troveblas ĉe <http://bertosch.free.fr/iik2006>. (Vidu ankaŭ nian kalendaron sur paĝo 20.)

Renkonto de Esperanto-Familioj, sude de Prago, Ĉeĥio (15–29 julio), troviĝas ĉe la tt-paĝaro <http://ref.esperanto.cz/>. Baldaŭan aliĝon oni petas. □

North West Esperanto Federation

You are invited to our convivial Spring Meeting in Preston on Saturday, 20 May.

It will take place at the Empire Services Club in Hartington Road, Preston PR1 8PP, near to Preston railway station. Parking is available both in Hartington Road and at the nearby park-and-ride site.

The event commences at 12 noon and will include a presentation from our guest speaker: Ian Mac Dowall. There will also be a report from the Federation president, conversation groups for learners and improvers, a bookstall and raffle. Copies of the Federation's excellent *De Maro al Kamparo* magazine will also be

available, and the meeting will end at 5 pm.

A buffet lunch and tea break are included.

To book please send a cheque for £8.00 to Andrew Wheatley, payable to SLEG at PO Box 103, Lytham St Annes FY8 3GU. Tel. 07946 215536 (mobile). Please make sure that Andrew receives your cheque no later than Monday, 15 May. Please tell Andrew if you are a vegetarian.

We look forward to seeing you there.

Paul Gubbins (President,
North West Esperanto
Federation)

Jim Voiels (Secretary, South
Lancashire Esperanto Group)

Sudlankaŝira grupo gastigis svisan esperantistinon

Charmian Common el Ĝenevo, kiu estas flua esperantisto kaj dancisto, venis al nord-okcidenta Anglujo komence de februaro por partopreni en la 'Crystal Boot Awards' en Blackpool. Ŝi kontaktis nian grupon antaŭ sia vizito por aranĝi specialan tagmanĝon kun niaj membroj.

Ni renkontis Charmian ĉe hotelo Brook House en kampara Lankaŝiro. Charmian donis al nia grupo kelkajn donacojn, kiuj inkluzivis svisan ĉokoladon, karton kun mesaĝoj de la Ĝeneva Esperanta grupo kaj ludilan krokodilon por kuraĝigi nin paroli pli da Esperanto.

Poste, en Blackpool, Charmian



kaj ŝia danca grupo gajnis premion, antaŭ ol ili flugis hejmen al Ĝenevo.

Nia bildo ekster Brook House montras (de maldekstre): Stephen Hodson, Daniel White, Charmian Common, Andrew Wheatley, Vivienne Isherwood, Gaynor Voiels, Jim Voiels kaj Ray Newman.

Jim Voiels

Esperantistoj en malriĉaj kaj nepagipovaj landoj arde deziras partopreni en la internacia vivo per membriĝo en UEA



*Helpu ilin per mona kontribuo al **Fondaĵo Canuto de UEA***

Membership

New Members

Carolyn Bridewater, Blaenavon
Leslie Bridgewater, Blaenavon
Phillip Fahey, London
J. Fratoni, London
Peter Kelton-Groves, Essex
G. Panting, Thatcham
Daniel White, Southport
Jeanne Day, St Andrews

Passed Intermediate examination

Ross Weekes, Driffield

Completed the Free Postal Course

Brian Scothern, Nottingham
Daniel White, Southport
Suzanne Wladschmidt, London

Deceased

Peter Haywood, Bournemouth
Eric McCanlis, Hassocks,
W. Sussex
Mr Parrott, Exmouth
A.D. Perry, Crieff, Perthshire

Tradicia novjara aranĝo por familioj kaj plenkreskuloj – la 23-a Internacia Festivalo

Ĉi-jare en Saarbrücken en komforta junulara hotelo. Detalojn vi trovas ĉe retpaĝaro www.internacia-festivalo.de. Aligilo kaj informoj haveblaj de: Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, D-34303 Niedenstein, Germanio. Tel. +49 56 24 80 07. Rete: HDP@internacia-festivalo.de

KUNVENOJ

MEETINGS

Ekpaku!

☆ Plena listo de aranĝoj konsultebblas ĉe: www.esperanto.hu/kalendar.htm aŭ www.eventoj.hu, aŭ sendu iun ajn retmesaĝon al la aŭtomato: kalendaro@esperanto.org. Se vi deziras rigardi mapon de aranĝoj, iru al: www.esperantoland.org

10–17 aprilo
29-a Studadsesio, Herzberg, Germanio. Inf.: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr. 6. Tel. +49/(0)5521-5983; rete: esperanto-zentrum@web.de; www.ic-herzberg.de

10–17 aprilo
22-a Printempa Semajno Internacia, St Andreasberg, Harz, Germanio. Inf.: Germana Esperanto-Asocio, Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-52474 Bad Neuenahr-Ahrweiler. Tel. +49-(0)2641-4885, fakse: +49-(0)9786-66 (oficejo); rete: psi@esperanto.de; www.esperanto.de/psi

13–18 aprilo
30-a Internacia Junulara Festivalo, Umbrio, Italio. ‘Esperanto – Ĉu lingvo de paco? Rete: ijf.admin@esperanto.it

15–18 aprilo
61-a Kongreso de SAT-Amikaro, Yzeure-Moulins, Allier, Francio. Inf.: Esperanto Moulins-Allier, 27 rue de la Fraternité, FR-03000 Moulins. Rete: esperanto.moulins@free.fr

15–22 aprilo
Festa Renkonto Internacia de Geknaboj, Grezjono, Francio. Inf.: Elizabet Barbay, 25 allée Gabriel Fauré, FR-93140 Bondy. Tel.: +33-(0)148 47 23 87; rete: eliz.babay@wanadoo.fr; www.gresillon.org

18–22 / 25–29 aprilo
Staĝo en Kvinpetalo, ‘Preparado al la kapableco kun Renée Triolle’, Bouresse, Francio. Inf.: Esperanto-Centro, Rue de Lavoisier, FR-86410 Bouresse. Tel/fakse: +33 (0)5 49 42 80 74. Rete: informoj@kvinpetalo; <http://kvinpetalo.free.fr>

27 aprilo–1 majo
3-a Sudafrika Subkontinenta Kongreseto, Muizenberg, Kaburbo. Internaciaj partoprenantoj bonvenaj. Inf.: Magali Von Blottnitz, 49 Balfour Road, Woodstock 7925. Tel:+27(0)21 448 6775; rete: magali@xsinet.co.za; www.esperanto.za.org/eo

28 aprilo–1 majo
2-a Fakseminario pri Esperanto-Bibliotekoj kaj arkivoj kaj Literatura Semajnfino, Herzberg, Germanio. Inf.: ICH, (vidu supre).

28 aprilo–1 majo
87-a Brita Esperanto-Kongreso, Scarborough. Inf.: EAB, Esperanto-

Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887

29 aprilo–1 majo
Staĝo en Kvinpetalo pri Rusio kaj la rusa, Bouresse, Francio. Inf.: vidu supre.

29 aprilo–9 majo
Esperanto-festivalo ‘Aroma Jalto’, Ukrainio. Inf.: p.k. 35, UA-01133 Kiev. Tel. +380-44-2851701; rete: volodimir_h@yahoo.com; www.aromajalta.by.ru

5–7 majo
7-a Trilanda Renkontiĝo de Germana Eo-Junularo, Cochem, okc. Germanio. Rete: Inge.Simon@esperanto.de; www.umatthias.de/trilanda

5 majo–4 junio
58-a Internacia Fervojoista Esperanto-Kongreso, Ŝanhajo, Ĉinio. Inf.: Internacia Klubo Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. Tel./fakse: +48-52-3461151. Rete: info@esperanto-turismo.com; www.esperanto-turismo.com

12–14 majo
Semajnfino de SATEB, Barlaston, Britio. Ed Borsboom prelegos pri Andreo Cseh kaj Lanti. Inf.: Arturo Prent; rete: arturo@signalprent.demon.co.uk

19–20 majo
Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, Kubo. Inf.: Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, La Habana.

19–21 majo
Internacia Junulara Renkontiĝo pri ‘Naciaj Kulturoj kaj Eŭropa Identeco’, Kostrena, Kroatio. Inf.: Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR-1000 Zagreb; rete: esperanto@zg.htnet.hr

20–22 majo
Mezkanada Renkontiĝo (turisma semajnfino) de Esperanto, Otavo, Ontario. Rete: informo@esperanto.qc.ca; www.esperanto.qc.ca

22 majo–1 junio
Trazigzagante la sudajn Karpatojn – turismi tra Rumano. Inf.: Ionel Oneț, ĉe UEA; rete: beronet@hotmail.com

24–8 majo
Berlina Arbara Renkontiĝo, Bad Münden (inter Hannover kaj Hameln), Germanio. Ideala por familioj. Inf.: Andi Münchow, Oberstr. 15, DE-30167 Hannover. Inf.: DL8oap@gmx.net; www.krokodilo.de/baro/baro.php

25–28 majo
100-jara Jubilea Kongreso de Sveda Eo-Federacio, Malmö; kun Kongreso de Dana Eo-Asocio. Rete: karin-lindquist@telia.com; www.agado.net

2–5 junio
100-jara Jubileo de Germana Eo-Asocio, 83-a Germana Eo-Kongreso, Braunschweig. Inf.: ICH (vidu supre).

Aligilojn bv. peti de: Christian Darbellay, Kaiserstr. 39, DE-24143 Kiel. Tel. +49-(0)431-737788; rete: Esperanto-Kiel@web.de; www.jubileagek.ic-herzberg.de

2-5 junio

101-a Skota Kongreso de Esperanto, Stirling, Skotlando. Inf.: Eo-Asocio de Skotlando, 47 Airbles Crescent, Motherwell ML1 3AP; rete: secretary@skotlando.org; www.skotlando.org

3-21 junio

37-a Nordamerika Somera Kursaro, ĉe School for Intl Training, Brattleboro, Vermont, Usono. Inf.: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia, WA 98512. Tel. +1-(360)7544563; rete: eddyellen@aol.com; http://esperanto.org/nask/

13-21 junio

28-a Ĉebalta Esperantista Printempo, Mielno, Koszalin, Pollando. Inf.: Filio de Pola Eo-Asocio, pk 30, PL-75-016 Koszalin; rete: barslavo@wp.pl; tel.: +48-503-417825; www.esperanto.koszalin.pl

16-18 junio

30-a Studadesio, Herzberg, Germanio. Inf.: ICH (vidu supre).

18-25 junio

12-a Internacia Arta Eo-Festivalo pri Eo-kantoj, Jalta, Ukrainio (+26-30 junio Turisma marŝo tra pitoreska Suda Bordo de Krimeo). Inf.: Jefim Zajdman, UA-98612, Jalta-12, p.k. 74 (Esperanto), Ukrainio. Tel. +380-654-231651. Rete: tero@yalta.us; www.jaltaespero.narod.ru

25 junio-2 julio

Internaciaj Someraj Kursoj de Esperanto, Lesjöfors, Svedio. Inf.: Esperantodomo, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. Tel. +46-(0)590-30909; fakse: +46-(0)590-30359; rete: egarden@esperanto.se

1-8 julio

Ekoturisma Seminario, Dobřichovice, apud Prago, Ĉeĥio. Inf.: P. Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice; rete: info@kava-pech.cz; www.kava-pech.cz/ekotur

1-14 julio

Pivniĉnaj Eo-Tagoj, Piwniczna, Pollando. Inf.: EFE-Zbigniew (Zbyšek) WARMUZ, ul. Bajeczna 1-104, PL-31-566 Kraków. Tel.: +48-12-4141256; rete: z.warmuz@chello.pl; www.internacia-gazeto.com/eventi/articolo_0002_pivniczna

3-21 julio

37-a Nordamerika Somera Kursaro, Brattleboro, Vermont, Usono. Inf.: Ellen M. Eddy (vidu supre).

4-8 julio

42-a 'Baltlandaj Esperanto-Tagoj', Kuressaare, Estonio. Temo: 'Unueco kaj diverseco de la popoloj ĉe Balta Maro'. Inf.: Esperanto-Asocio de Estonio, Raekoja plats 14, EE-10146 Tallinn. Tel. +372-6035272; rete: esperant@hot.ee

4-8 julio

Lernu kaj Ĝuu en la Popola Instituto de Valamo, Finnlando. Inf.: Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku. Tel. 02-2305319; rete: eafsekretario@esperanto.fi

15-21 julio

Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK, Timișoara, Rumanio. Inf.: Maria Butan, Aleea Ripensia 34/3, RO-300585 Timișoara.

15-29 julio

28-a Renkontiĝo de Esperantaj Familioj, Ĉeĥio. Inf.: Vladimír kaj Pavla, Gregorova 2563, CZ-397 01 Písek. Tel. +420-774-999091 (Vlada), +420-774-942424 (Pavla), rete: vl.dv@centrum.cz; http://ref.esperanto.cz

20-27 julio

Internacia Familia Renkontiĝo pri la kuirarto, Kijevo, Ukrainio. Montru bongustajojn de via popolo! Inf.: pk 91, UA-04201 Kiev, Ukrainio. Tel. +380-44-4320743; rete: ml@espero.kiev.ua (Mikaelo Lineckij) aŭ limih@bigmir.net; http://www.espero.kiev.ua/

21-24 julio

54-a ELNA-Kongreso, Novjorko, Usono. Inf.: ELNA, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel. (510) 653 0998; rete: elna@esperanto-usa.org

21-25 julio

65-a Hispana Kongreso de Esperanto, El Puig, Valencio, Hispanio. Inf.: Hispana Eo-Federacio, Calle Rodríguez San Pedro, 13-3º-7, ES-28015 Madrid. Rete: augustocasquero@hotmail.com; www.esperanto-es.net

23-28 julio

Scienca Konferenco okaze de la 100-jariĝo de ISAE, Tavoletto, Italio. Inf.: D-ro R. Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269 Eschwege, Germanio.

25-29 julio

39-a ILEI-Konferenco, Parma, Italio. Temo: 'Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj'. Inf.: LKK de la 91-a UK, ĉe IEF, Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano, Italio. Rete: uk2006.informoj@esperanto.it; www.ukflorenco2006.it/unikodo/til_ar/ilei

29 julio-5 aŭgusto

91-a Universala Kongreso de Esperanto, Florenco, Italio. Inf.: UEA (vidu paĝon 2); www.ukflorenco2006.it

29 julio-5 aŭgusto

37-a Internacia Infana Kongreseto, Prato, Italio. Inf.: Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio. Rete: bert.schumann@free.fr

6-13 aŭgusto

62-a Internacia Junulara Kongreso, Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. Inf.: TEJO ĉe Universala Esperanto-Asocio (vidu paĝon 2); rete: hara@ikso.net; www.tejo.org/ijk

12-18 aŭgusto

Somera Festivalo, Barlaston, Anglio. Inf.: EAB (vidu paĝon 2). Tel. 0845 230 1887

12-19 aŭgusto

56-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia, apud Vrchlábí, Ĉeĥio. Rete: polnicky@quick.cz

13-20 aŭgusto

Internacia Junulara Semajno, Makā, Hungario. Inf.: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87. HU-1675 Budapest, Hungario. Rete: ijs@ijs.hu; www.ijs.hu

17-20 aŭgusto

Esperanto-Renkontiĝo en Hungario, Makā. Inf.: Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. Rete: hea.officejo@eszperanto.hu

19-26 aŭgusto

79-a SAT Kongreso, Beogrado, Serbio. Inf.: Terezija Kapista, Studentska 39/23, SCG-11070-27 Novi Beograd, Serbio. Rete: jakvo@mac.com (Jakvo Schram); http://users.pandora.be/jakvo/SAT/SAT-Beogrado

20-27 aŭgusto

FESTO 2006, Kastelo Grezjono, Francio. Rete: cyrille@esperanto-jeunes.org; http://esperanto-jeunes.org/

20-28 aŭgusto

15-a MEMzorga LAGumado, Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbani sin. Inf.: (poŝtel.) Laca +36-30-2097864; Andi (antaŭ 13 aŭg. nur SMS-mesaĝetojn): +36-30-2752068. Inf.: rete: DL8oap@gmx.net; www.krokodilo.de/mela

24-26 septembro

1-a Niĝeria Esperanto-Kongreso, Badagry. Eksterlandanoj aparte bonvenaj. Inf.: Esperanto-Federacio de Niĝerio. Rete: efen_2002@yahoo.co.uk

20-22 oktobro

Course-You-Can Speak Esperanto, Barlaston, Anglio. Inf.: EAB (vidu paĝon 2). Tel. 0845 230 1887 kaj www.esperantoeducation.co.uk

27 decembro-3 januaro

23-a Internacia Festivalo (arango por familioj kaj plenkreskuloj), Saarbrücken, Germanio. Inf.: Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Nidenstein. Tel/fakse: +49-5624-8007, +49-171-4964558 (poŝtel.). Rete: hdp@internacia-festivalo.de; www.internacia-festivalo.de

2007

27 julio-3 aŭgusto

Internacia Junulara Kongreso, Hanojo, Vjetnamio. Inf.: TEJO ĉe UEA (vidu malsupre).

4-11 aŭgusto

92-a Universala Kongreso de Esperanto, Jokohamo, Japanio. Inf.: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. +3110-4361044; fakse: +3110-4361751. Rete: uea@inter.nl.net